n-ro 67

januaro 2000

# La Merkato

ISSN 0941 9306

**Staĝoloko eksterlande petata de 26 majo ĝis 30 junio 2000**

S-ino Violette WALTHER, studentino pri ekonomio (internacia komerco) el Francio (regiono de Strasburgo) urĝe serĉas staĝolokon eksterlande.
Skribu al: 1, route de Mackwiller, F-67430 DIEMERINGEN, Francio, tel. 03.88.00.40.71, rete <walther.violette(a)wanadoo.fr>.

**Eŭropa Unio: necesas traduki patentojn!**

Eblas ke eŭropa patento havas neniun efikon en iu membro-ŝtato de la EU, se ĝi ne estas tradukita en oficialan lingvon de tiu ŝtato. Tiu ero de la Traktato pri eŭropaj patentoj ne konfliktas kun la libera trafiko de varoj garantiita de la EU-Traktato. Tion konkludis la Eŭropa Kortumo je 21 septembro 1999 en afero de germana entrepreno BASF.

el Eŭropo sen Limoj, nov.-dec. 1999 (ISSN 1021 240X)

**Enhavo**

Novjara saluto de la Prezidanto . . . . . 3
Klubo de inventistoj . . . . . 4
Anoncitaj aranĝoj . . . . . 5
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . 6
Terminologio . . . . . 8
Eŭropaj kulturaj programoj . . . . . 9
Laborplano 1998-2000 . . . . . 10
Belgio: fikciaj entreprenoj ne bonvenas . . . . . 12

**La Merkato** (LM)(ĝis numero 26: Laŭokaza Novaĵletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

Atentu !
Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj je 6.1999 estas proksimume 1 EUR = 1,05 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo.

Rabatita komuna kotizo IKEF-TAKE:
Landokategorio A: 27 EUR; landokategorio B: 18 EUR

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

**Perantoj**

*Belgio kaj internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be, belga pĝk. 000-0265338-43)

*Ĉeĥio:* S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE; tel./fakso/re-g.420-631-332507, retpoŝto vlada_hasala(a)iol.cz

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)agora.stm.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)



## **Novjara Saluto de la Prezidanto**

Estimataj gekolegoj, karaj IKEF-anoj,

Nun ni troviĝas en la mistika jaro 2000 delonge scivoleme atendita kaj priaŭgurita. Se baldaŭ ni rutine alkutimiĝos al la ĉiutaga skribado de '2000', ni konstatos, ke ĝi evoluas al tute normala jaro kiel la antaŭaj.

Ĉi-jare IKEF 'festas' sian 15-jaran ekzistadon, ĉar vi eble memoras la fondon dum la 70-a UK en Aŭgsburgo je 6 aŭgusto 1985. En tiuj 15 jaroj ni multon atingis kaj realigis: solidan administran kaj financan bazon, statuson de fakgrupo aliĝinta al UEA, terminarajn kaj aliajn eldonaĵojn, verkadon pri fakaj temoj, tradukservojn inkluzive havigon de reklamanoncoj al Eo-gazetaro, vizitojn ĉe firmaoj, Komerĉaj Ĉambroj kaj Ekonomikaj Universitatoj en UK-urboj kiel laste en Montpeliero kaj Berlino, entute certagradan renomon ene de la Esperanto-mondo.

Do, ĉu ni rajtas esti kontentaj? Unuflanke jes. Sed aliflanke, rigardante la katalogon de celtrafaj agadoj el nia Laborplano 1998 - 2000 finiĝonta post 12 monatoj, ni honeste kaj sincere devas konstati, ke multaj agaderoj ankoraŭ ne aŭ ne sufiĉe estas prilaboritaj. Mankas ne laboro por ni, sed laborfortoj. Bonvolu permesi al mi, ke mi alvokas vin denove pri via engaĝita kunlaboro. Kaj por ne disipi niajn malmultajn fortojn, mi rekomendas ke vi nepre koncentru vian agadon al tiu(j) el la programeroj listigitaj en la Laborplano 1998 - 2000, kie vi havas viajn personajn fortojn kaj spertojn.

Mi deziras al vi kaj viaj familianoj bonan Jaron 2000, plene de sano, feliĉo kaj prospero, kaj ne lastrange multe da plezuro kaj sukceso en via agado por IKEF kaj Esperanto.

Franz Josef Braun, Prezidanto

## **IKEF-membro Kees Ruig honorigita**

Je la 23a de novembro la Ĉambro de Komerco 'Centraal Gelderland' (Nederlando) per prelegoj kaj akcepto adiaŭis Kees Ruig, kiu dum 14 jaroj estis konsilanto pri internacia komerco.

Je la 1a de decembro 1999 Kees Ruig pensiiĝis. Pro tio forfalas la oficejaj adresoj; restas senŝanĝaj la hejmaj telefono kaj fakso: +31-24-3580320.



**Internacia Inventista Konkurso: KLUBO DE INVENTISTOJ**

La Inventistan Klubon fondis kaj gvidas la nuna prezidanto s-ro Bruno Dalla Pozza, itala koncerta majstro kaj profesoro pri muziko en la Mariana Universitato en Saipan. La klubo per reto de agentoj en diversaj landoj de la mondo serĉas bonajn ideojn, malkovrojn kaj inventojn, registras ilin unue en la lando de la aŭtoro kaj pere de la Inventista Klubo kaj la Mariana Universitato en Usono kaj poste, helpe de la agentoj, ankaŭ en aliaj landoj de la mondo. Sed ĉi tie komenciĝas ankaŭ aktiva rolo de la klubo: la agentoj klopodas pri la praktika eluzo de la registritaj inventoj kaj klopodas trovi la interesiĝantojn. La laborlingvo en la klubo estas Esperanto kaj en la internacia lingvo estas verkitaj ankaŭ ĉiuj klubaj dokumentoj (la registriloj, kontraktoj) kaj en ĝi okazas ankaŭ la komunikado inter la membroj kaj la agentoj, precipe per interreto.

La klubo serĉas kunlaborantojn

Kvankam la Inventista Klubo havas nuntempe nur kelkajn aktivajn membrojn kaj agentojn, la rezultoj estas mirindaj. Sed ankoraŭ pli mirindaj estas la eblecoj kaj la planoj de la klubo. Pro tio la klubo serĉas novajn interesiĝantojn pri la kunlaboro. Bonvenaj estas novaj inventistoj kaj klubaj agentoj, kiuj perus la kontakton inter la klubo kaj la enlandaj inventistoj (tiuj povas esti ankaŭ ne-esperantistoj) - aŭ inter la aŭtoroj kaj interesiĝantoj pri la komerca eluzo de la inventoj. La agentoj ne devas esti patentaj specialistoj: pli gravas la komerca talento, spertoj, aktiveco, inventemo kaj kreemo. Por eviti miskomprenojn estas tamen postulata deca lingvoscio de Esperanto. La agentoj do reprezentas la interesojn de la Inventista Klubo kaj de ĝiaj aŭtoroj-inventistoj sur la teritorio de sia lando, serĉas novajn malkovrojn kaj inventojn, registras ilin pere de la klubo kaj proponas por la komerca eluzo en sia lando la jam registritajn inventojn el la arkivoj de la klubo. La klubo kaj ties agentoj plene respektas la aŭtorrajtojn kaj peras la kontraktojn nur post interkonsento kun la aŭtoro, tenante en diskreteco ĉiujn detalojn pri la inventoj, aŭtoroj kaj membroj.

Registrado de la inventaĵoj

La registrado plene respektas la aŭtorrajtojn kaj havas kelkajn ŝtupojn. La unua okazas, pere de la agento kaj la kluba registrilo, en hejmlando de la aŭtoro (pere de atestantoj kaj notariaj registroj). La agento peras la duan ŝtupon de la registrado en la Inventista Klubo sur la insulo Saipan en Marianoj kaj sekva patenta registrigo en Usono, kun notaria atesto kaj arkivigo, pere de la Scienca Fako de la Mariana Universitato, en arkivoj de la Usona Kongreso (U.S. Library of Congress). Sekvas registrado kaj klopodoj de la klubo kaj ties agentoj pri la disvastigo kaj komerca eluzo en aliaj landoj de la mondo. Diference de la klasikaj patentaj institucioj la Inventista Klubo do krom la registrado aktive klopodas disvastigi la inventaĵojn kaj praktike ilin eluzi.

<u>Aliaj aktivaĵoj de la klubo</u>

Krom la priskribita laboro kaj la inventistaj konkursoj la Inventista Klubo estas malfermita al ĉiuj bonaj iniciatoj, kiel, pere de Esperanto, plifaciligi au plibonigi la vivon de la homoj, trovi novajn talentojn au ideojn, au peri la malkovrojn de unu lando al la aliaj.

Kontaktoj:
Prof. Bruno Dalla Pozza <dobruno(a)itecnmi.com>
Stano Marcek <marcek(a)esperanto.sk>

(ret-info)

## <u>Anoncitaj aranĝoj</u>

### Ĉinio: Unua Esperanta Konferenco pri Ekonomio kaj Komerco

Okazos je 1a ĝis 5a de aprilo 2000 en Siano, Ĉinio. Organizanto: s-ro Chielismo VON, Xi'an-a Esperanto-Asocio, Jian-Gong-Lu 8, CN-710043 Xi'an,Chinio. Tel:+86-29-2242215, tel/fakso:+86-29-2232952, reto: komerco(a)public.xa.sn.cn

### Estonio: 36-aj Baltaj Tagoj (BET-36)

Je 2-8 julio 2000 en Tallinn, Estonio. Informoj: s-ino Helju LAINJÄRV, str. Käo 21-2, 11311 TALLINN, tel. (2)6-553-008.

### Ĉeĥio: Ekonomia kolokvo en novembro 2000



Kolokvo okazos je 2000-11-10/12 en Prago kun la ĉefa temo "Ekonomio sojle al la tria jarmilo". La ceteraj du temoj en apartaj sekcioj jam estas tradiciaj: Sekcio B: Terminologiaj problemoj de apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko kaj Sekcio C: Scienco kaj tekniko ĝenerale. Informoj kaj aliĝiloj: Petro Chrdle, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice (Prago) Tel: +420.2.9912201,fakso:+420.2.9912126;rete: chrdle(a)kava-pech.cz.

### 5a Tut-Amerika Esperanto-Kongreso en 2001

Okazigos ĝin la Meksika Esperanto Federacio en Meksikurbo inter la 15a kaj 21a de aprilo 2001. Vi povas trovi la kongresinformojn pere de la MEF paĝoj ĉe http://www.punto-y-aparte.com/esperanto/

Don HARLOW

## <u>Komercaj petoj kaj proponoj</u>

**Oferto de ĉeĥaj produktoj**

Ekskluzivema likvoro kun viva frukto

Tuta frukto en botelo - unika teĥnologio de enboteligo - belega aspekto de botelo, taŭga kiel donaco. La frukton vi povas elekti el mandarino, oranĝo, citrono, abrikoto au piro. 25% da alkoholo, enhavo 0,7 litro (el tio minimume 50% da likvoro), garantio de 6 monatoj, prezo de 1 botelo 4.70 USD (Ex Works - El Fabriko)

Teksitaj etikedoj, emblemoj, borderoj, flagetoj kaj paĝosignoj, produktataj el poliestera ŝpinaĵo

- daŭremaj, laveblaj kaj kolorkonservaj
- formo laŭ deziro de kliento (kvadrata, oblonga, triangula, cirkla, elipsa ktp.)
- produktoj havas fandfermitajn randojn, oni povas ilin tuj alkudri - larĝeco de 2 cm ĝis 12 cm, longeco nelimigita
- maksimume 4 koloroj
- prezo de 1 peco 0.10 - 0.50 USD (Ex Works - El Fabriko)
- minimuma kvanto 1000 pecoj (pligrandaj etikedoj, emblemoj kaj paĝosignoj 500 - 600 pecoj)

Ceremonia brokato eklezia
(ne ekzistas multe da similaj produktejoj!)

Ceremonia brokato por pastraj ornatoj en ritaraj koloroj prezo de 1 kvadratmetro 5.70 USD (Ex Works - El Fabriko)
En kazo de via intereso mi tuj sendos specimenojn.

CIDARU s.r.o.
Ostrozna 16 telefono +420 653 218601
CZ - 746 01 Opava fakso +420 653 625720
Ĉeĥio reto: caletka(a)opava.cz (J. Caletka, IKEF 239)

------------------------------------------------------------



**Sponsoro serĉata**

Ĉu ekzistus ia homo kun bona volo por enordigi vojon (110 m longa, 3,5 m larĝa), je centro de la urbo Shëngjin, ĝis nia projektita E-oficejo? Ĝi nomiĝus 'Vojo Esperanto'. Estus bona montrilo pri solidareco de esperantistaro. S-ro Bahri PERAJ, No. 72, Shëngjin-Lezhë, Albanio.

**Bjelorusio**

Merkatesploro en bjelorusa merkato, serĉado de informoj pri bjelorusaj entreprenoj, helpo en fondado de komunaj entreprenoj, jura helpo, diversaj komercaj proponoj: S-ro Henadzi KURHUN, IKEF 297, °1971, merkatisto ĉe muntada entrepreno BSPM, Prospekt J. Kupaly 54-64, BY-230010 GRODNO, tel.+375-152-444260; fakso +375-152-750276, +375-152-442163.

**Ganao**

Ĉu vi intencas ekspansii vian merkaton al Okcidenta Afriko? Komencu per Ganao. Kontaktu min por la necesaj aranĝoj: Alfred Kabina Arthur, direktoro de AKA Export Ventures, P.O. Box TS 404 Teshie, Accra. Tel. 233-21-226142, fakso 233-21-221213, rete <aka(a)mckcc.africaonline.com.gh>.

**Hungario**

Mi serĉas partnerojn el diversaj landoj de Eŭropo por internacia, jam funkcianta negoco. Se vi havas iom da interesiĝo pri sano, pri moderna nutrado, aŭ pri varbado, kaj se vi volas ĉeesti ĉe la mondskala disvastiĝo de bona, stabila, korekta negoco kun bona profito, petu pli detalan informilon! Ekzistas plurlingvaj materialoj, do ankaŭ informu min pri viaj lingvoscioj.

En 17 landoj baldaŭ ekfunkcios ankaŭ tute nova negoco por uzantoj de mobiltelefonoj kiuj volas protekti sian sanon dum telefonado.

Kontaktu: BAJÁKI Imre, Holló László u. 24, H-6100 KISKUNFÉ-LEGYHÁZA, tel. +36-20-9412-399, rete <baja59(a)freemail.c3.hu>.
Mi antaŭdankas, se interesiĝantoj kiuj volas ricevi leteron perpoŝte, sendas 1-2 IRK.

**Irano**

Diversaj grajnoj (ekz. pizo, fazeolo, lento, ktp) kaj sekigitaj fruktoj (ekz. daktilo, sekvinbero, pistako, karno, migdalo, ktp) plej bonkvalitaj iranaj estas pretaj por eksporti al vi. Ankaŭ mi pretas profesie kunlabori pri turismo kaj aliaj komercaj kampoj. S-ro Sadegh Karami (IKEF286), P.O.Box 6864 , IR- 15875 Tehran, tel/fakso: +98 21 2086574, rete: s-karami(a)neda.net.



## Terminologio

Invito partopreni en la distribulisto "terminologio"

Por subteni la kunlaboradon de E-terminologoj kaj seriozaj interesatoj pri la terminologia agado, helpi al ili kongruigi siajn laborojn kaj prepari tiel bazon por reaktiviĝo de Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC) estas lanĉita nova distribulisto "terminologio-L". Administranto de la listo estas Petro Chrdle <chrdle(a)kava-pech.cz>. La listo estas malfermita, do aliĝi rajtas ĉiu serioza fakulo sen pliaj aliaj postuloj.

En la listo estu diskutataj ĝeneralaj kaj teoriaj problemoj, sistemaj aferoj, ktp, ne unuopaj terminaroj aŭ terminoj. Tamen, estus tre utile mencii vian laboron kaj atingojn en iu konkreta terminaro. Tre verŝajne pere de la listo oni povas trovi kolegojn, helpantojn... kaj sekve labori memstare - ni diru kreante iuspecan subaron de la listo - sur konkreta terminaro aŭ vortaro de konkreta fako...

Kiel unu de gravaj komencaj komunaj agoj mi vidas registri ĉiujn ekzistantajn terminarojn kaj vortarojn, por ke oni havu trarigardon pri ili.

Manieroj aliĝi:

1. sendu malplenan (blankan) mesaĝon al la adreso <terminologio-L-subscribe(a)eGroups.com>;
   revenos mesaĝo kun peto por konfirmi la aliĝon

2. eblas aliĝi ankau ĉe la adreso: http://www.eGroups.com

Petro Chrdle, UEA-estrarano pri faka kaj scienca agadoj kaj pri edukado <chrdle(a)kava-pech.cz> (tra Ret-Info)

Elektronikaj terminaroj en Interreto

Ekzistas nuntempe du ambiciaj terminaraj projektoj en Interreto. Je www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/ estas pliampleksigita versio de Plena Ilustrita Vortaro. Alia projekto, bazita sur Plena Vortaro (1934), videblas je

www.steloj.de/esperanto/revo/.

Jen ankoraŭ kelkaj aliaj adresoj, en kiuj eble estas ideoj por novaj IKEF-projektoj:

* Sur mia paĝo http://mujweb.cz/Kultura/malovec aperis pluraj terminaroj (ekz. matematika). (Miroslav Malovec, <starto(a)clavis.cz>)

* En Eventoj-175 aperis artikolo pri la reta aperigo de provversio de universitata lernolibro pri optiko. Laŭ la alvenintaj komentoj estas faritaj multaj korektoj kaj ĝustigoj. Estas nun afiŝita la ampleksigita kaj korektita versio en HTML- kaj PDF-formatoj je:
  www.hungary.net/esperanto/libroj/optiko.zip (HTML-versio) kaj www.hungary.net/esperanto/libroj/optiko.pdf
  Viaj rimarkoj estas bonvenaj ĉe la autoro: Janos Sarkozi, Pf 127, HU-2600 Vac; rete p.a. <eventoj(a)esperanto.org>.

* Mi trovis fascinan TTT-adreson kun abundego da elektronikaj vortaroj, dulingvaj, unulingvaj, ĝeneralaj, fakaj, ampleksaj, magraj, inter lingvoj vivantaj kaj mortintaj, konsulteblaj, elŝuteblaj je:
  www.facstaff.bucknell.edu/rbeard/diction3.html
  La aranĝo estas laŭ lingvo-familioj kaj poste lingvoj. Esperanto ne havas sekcion, sed sub Nederlanda (Dutch) vi trovos NL-Esperantan. Klaku tion, kaj vi eniros alian listigon, en kiu vi trovos plurajn Esperantajn vortarojn, kun almenaŭ ses aliaj lingvoj. Eble iu trovos ĝian rektan adreson kaj scias kiu laboris aranĝi tion.

<stefan.macgill(a)GALAMB.NET>, tra Ret-Info)

## <u>**Interret-adresoj de eŭropaj kulturaj programoj**</u>

Jen la retadreso de la diversaj programoj SOCRATES, ERASMUS, COMENIUS, ktp: http://www.europa.eu.int/en/comm/dg22/socrates-.html. Tie vi trovas informojn pri la kondiĉoj por peti financan subtenon por viaj projektoj.

La oficialajn tekstojn oni trovas en 11 oficialaj lingvoj. Ni precizigas ke Erasmus (universitata aŭ supra nivelo), Comenius



(ĝenerala edukado: infana + unua + dua niveloj) ne estas apartaj programoj, sed partoj de Socrates. Ni pensas ke la projekto Neighbour povus prezenti sin en Comenius se oni trovas kelkajn lernejojn en almenaŭ tri landoj, kun kunlaboro de universitatoj, asocioj, entreprenoj, regionaj kaj lokaj institucioj, kiuj proponas kunlaboron por testi pilotprojekton uzante Esperanton kiel pont-lingvon por lerni aliajn lingvojn.

Alia ebleco estas sur linio B 3 1000 'Ĝenerala kooperacio en Edukado' kiu ebligas pilotprojektojn kiuj poste, se estas positivaj rezultoj, povus enŝoviĝi en Socrates. Estas plej facila vojo ĉar ĝi ne bezonas la akcepton de la subkomitato Comenius, nek de la komitato Socrates. Tiu linio dependas de la Eŭropa Komisiono. Se estus rekomendado de la Eŭropa Parlamento, havus kompreneble pli da ŝanco.

Michael Cwik - Georgia Henningsen

## Laborplano 1998-2000

En nia Ĝenerala Kunveno 1998 en Montpeliero ni akceptis la Laborplanon 1998 - 2000, kiun ni estis ellaborintaj kadre de la UEA-kampanjo 2000 por internacia lingva ordo. Tiu laborplano, kiun vi denove trovas sur apuda paĝo, enhavas diversajn celtrafajn agadojn (celtrafe en la senco de nia laŭstatuta celo AKCEPTIGI/ENKONDUKI ESPERANTON SUR LA KAMPOJ KOMERCO, EKONOMIO KAJ EKONOMIKO). La estraro elektis specife ĉi tiujn agadojn, ĉar ili havas realisman ŝancon por realigo.

Hodiaŭ mi volas atentigi vin al cifero 1.4.2 c):

**Havigi reklamanoncojn de entreprenoj al Esperanto-gazetoj.**

Tiu agado estas miaopinie unu el la plej valoraj por ni kaj havas trioblan avantaĝon:

1. La varbanta firmao kaj la koncernitaj dungitoj konstatas, ke Esperanto efektive ekzistas kaj taŭgas ankaŭ por reklamo; do ke Esperanto estas serioza afero kaj la perantaj E-istoj seriozaj homoj.
2. La traduko de reklamanonco el nacia lingvo al Esperanto estas altkvalita lingva laboro, kvazaŭ defio, ĉiukaze valora ekzercado por la tradukanto. Plej ofte ne eblas laŭvorte traduki, sed pli ĝuste oni devas kapti sencon kaj eldiron de la nacilingva reklamo kaj trovi adekvatan formulon en Esperanto. Prefere tia traduko estu komune farota de pluraj personoj.
3. Reklamo alportas monon en la kasojn de la Esperanto-movado; unue en la kason de la koncerna revuo (ekzemple MONATO), due procentaĵon de la prezo por la peranto respektive por IKEF. Se vi konsideras la gigantajn sumojn ĉiutage elspezatajn por reklamo, vi facile povas imagi, ke eĉ malgranda guto el tio povus esti 'varma pluvo' por la Esperanto-movado.

Ne ĉiu firmao taŭgas por tia reklamo. Preferinde estas firmaoj kiuj internacie disvendas produktojn por finkonsumantoj. Sed estas esceptoj. Oni devas esplori, kiu firmao aŭ kiu entreprenisto kondutas iom favore al Esperanto. Personaj rilatoj helpas. Se vi kontaktas firmaon por akiri reklamanoncojn por Esperanto-revuoj, bonvolu nepre montri ekzemplojn de jam faritaj reklamoj, ekzemple en MONATO. (De



MONATO vi ricevos aron da ekzempleroj por via agado).

Mi deziras al vi iom da kuraĝo kaj energio por komenci tian agadon. Kaj fine sufiĉe da sukceso, kiu plene rekompencos viajn klopodojn. Nia celo estu, ke MONATO ricevu ĉiumonate unu reklamanoncon el la rondo de IKEF-membroj.

Franz Josef Braun, Prezidanto

| IKEF-LABORPLANO 1998-2000, kadre de UEA-Kampanjo 2000<br>por internacia lingva ordo, aprobita dum la ĝenerala kunveno de IKEF | | | |
|---|---|---|---|
| cif.<br>UEA | speco de agado | responsulo<br>↓ | prioritato↓ |
| 1.4.1 | Kampanjo "por pli vasta verdujo"<br>Pligrandigi la membraron de IKEF<br>a) Difino de celgrupoj varbotaj<br>Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko<br>b) Difino de membronombro atinginda<br>200 membroj ĝis fino de 2000<br>- moto: Ĉiu membro varbu novan membron<br>- sendigi varbleteron tra UEA al ĉiuj UEA-membroj , kies profesio rilatas al nia fako<br>c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj celgrupoj; establi laborgrupon por tio | estraro<br><br>estraro<br>ĉiuj m.<br>prez. FJB<br>prez. FJB | 1<br><br>1<br>1<br>1<br>2 |
| 1.4.2 | Celtrafaj IKEF-aj agadoj<br>a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj<br>b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj Esperanto-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF-membroj ĉeestas la aranĝon<br>**c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E-gazetoj**<br>d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj komercistoj<br>e) Terminara laboro<br>f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj | prez. FJB<br>koncernataj membroj<br>ĉiuj membroj<br>ĉiuj membroj<br>Yamasaki<br>membroj k. ĵurna-lisma talento | 1<br>2<br>1<br>1<br>1<br>1 |
| 2.1.1 | Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF<br>a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT<br>b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retpoŝto<br>c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto<br>d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako) | B. Holm<br>ĉiuj membroj<br>redaktoro RR<br>Yamasaki S. | 1<br>1<br>2<br>3 |



| | | | |
|---|---|---|---|
| 3.5 | Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF<br>a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio<br>b) Naciaj ministerioj pri ekonomio<br>c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj komercaj altlernejoj<br>d) Komercaj Ĉambroj | M. Cwik<br>prez. FJB<br>sciencistoj pri ekonomio<br>membroj kun kontaktoj al K.Ĉ. | 2<br>3<br>2<br>2 |

**Belgio: Fikciaj entreprenoj ne bonvenas**

Lastatempe ĉe la belgaj Ĉambroj por Metioj kaj Negocoj alvenis pluraj dosieroj de kompanioj fonditaj laŭ la leĝo de usona ŝtato Delaware. Temis pri personoj kiuj volas komenci etan komercon en Belgio, sen respekti la belgajn regulojn pri minimuma kapitalo, respondeco de la fondintoj, aperigo de bilancoj, ktp.

Fiuloj 'vendas' kompaniojn fonditajn kun nur simbola kapitalo en Delaware. Tia kompanio - sen iu komerca aktiveco en Usono - fondas 'filion' en Belgio kiu ŝajnigas esti kompanio fondita laŭ belga leĝo, sed je kiu nek la belgaj oficialaj instancoj, nek la liverantoj havas iun povon. La provincaj ĉambroj decidis ke tiaj kompanioj ne povas ricevi permeson por komenci komerci. La apelacia komisiono konfirmis tiujn decidojn.

La belgaj Ĉambroj por Metioj kaj Negocoj

Kontraŭ al la Komercaj Ĉambroj, kiuj en Belgio estas privataj societoj al kiuj entreprenoj libervole aliĝas, la Ĉambroj por Metioj kaj Negocoj estas publikaj instancoj, establitaj en la provincaj ĉefurboj, dependaj de la Ministerio pri Mezaj Klasoj kaj Agrikulturo.

Ili ekestis komence de la 20a jarcento kaj iliaj taskoj dum la jardekoj evoluis laŭ la bezonoj kaj cirkonstancoj. Nuntempe ili ĉefe kontrolas ke personoj kiuj volas fondi etan komercon havas la bezonatajn administrajn kaj profesiajn kapablojn. La Ĉambroj liveras la atestojn bezonatajn por tiaj komercoj. Krome, ili pritraktas petojn por provinciaj premioj.

En la ĝenerala asembleo, elektita ĉiujn sesan jaron, estas reprezentantoj de provincaj kaj regionaj profesiaj asocioj, de socio-ekonomiaj asocioj kaj de interprofesiaj organizoj. La asembleo elektas dekpersonan estraron kiu kunvenas ĉiusemajne kaj prizorgas, kun helpo de sekretariejo, la mastrumadon de la Ĉambro. FW

**Verdun: Nova prospekto en Esperanto !**



S-ro F.-X. GILBERT, estrarano de IKEF kaj prezidanto de la regiona asocio ESPERANTO FRANCE-EST, iniciatis la eldonigon de luksa esperantlingva prospekto de Monda Centro de la Paco - Centre Mondial de la Paix, Place Monseigneur Ginisty, F-55100 VERDUN, Francio; tel. +33 (0)3 29 86 55 00, fakso: +33 (0)3 29 86 15 14, rete <cmpaix(a)wanadoo.fr>. La prospekto povas esti petata ĉe la supra adreso. Edmond LUDWIG